

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO

EN PRAHA • Fondita en 1902

BAZA ORGANIZAĴO DE ĈEA

n-ro 2/1989

aprilo 1989

Výroční členská schůze Klubu esperantistů v Praze (Jarkunveno de la Esperantista Klubo en Prago)

20. února 1989 se konala výroční členská schůze, které se tentokrát zúčastnilo velmi málo členů. Některé náměty z diskuse budou řešeny na výborových schůzích.

Výroční členská schůze schválila nové klubové příspěvky platné od 1.1.1990, a to:

pracující a pracující důchodci	50,- Kčs
důchodci do 70 let, vojáci, studenti a rodinní příslušníci	30,- Kčs
důchodci přes 70 let	10,- Kčs
Každý člen může zaplatit jakoukoliv dobrovolnou vyšší částku jako dar.	
Zápisné – jednorázově.	10,- Kčs.

Dále výroční členská schůze zvolila nový výbor klubu a revizní komisi. Na schůzi výboru bylo potom provedeno rozdělení funkcí:

předseda klubu – kluba prezidanto:	Ing. Zbyněk Khail
místopředseda – vicprezidanto:	Jindřich Ondráček
pokladník – kasisto:	Marta Křenková
hospodář – mastrumanto:	Ing. Karel Blažek
redaktoři Bultena – Bulteno-redaktorj:	Jiří Patera, Dana Davidová
pedagogický referent – pedagogia referento:	Ing. Jaroslava Blažková
členský referent – membro-referento:	Květa Hubnová
členi – membroj:	Karel Krejča, Václav Štěpánek, Alena Vaněčková
revizní komise – revizia komisiono:	
předseda – prezidanto:	Anežka Štěpánková
členové – membroj:	Pavel Ambrož, Ladislav Kynčl

K 20. 2. 1989 měl klub 256 členů, z toho 149 žen a 107 mužů. Za uplynulé volební období přibýlo 29 nových členů a ubylo 42 členů, z toho čtyři zemřeli: ss. Čálek, Rathay, Květuše Lazecká, Adolf Bartošík.

Nejstarší členkou klubu je Marie Šiková, nar. 7.12.1896, nejmladším členem je Richard Pospíšil, nar. 20.9.1974. Věkový průměr členů je 54 let. 3 měsíce, věkový průměr výboru je 43 let, revizní komise 51 let.

Ve školním roce 1988/89 se do kursů pro začátečníky přihlásilo 68 žáků, do kursu pro pokročilé 39 žáků. Začátečníci byli rozděleni do 3 kroužků, které vedou Ing. Veselý, s. Křesinová a Ing. Dvořák, pokročilí byli rozděleni do 2 kroužků, které vede s. Štruncová.

Pro žáky byla urychleně zpracována skripta (s. Štruncová), když se ukázalo, že je nemožné získat jakékoliv učebnice. Ještě ani k dnešnímu dni není k dispozici očekávaná učebnice prof. Baraňdovské, ani cokoliv jiného.

Post grava malsano mortis la 3-an de februaro

s-ano Adolf Bartošík

membro kaj iama komitatano de nia klubo, honora membro de ĈEA. Dum pluraj jaroj li gvidis la kunvenojn de nia klubo, li estis vicprezidanto de nia klubo, sperta filatelisto, profesia instruisto. Li mortis en aĝo de 82 jaroj. La adiaŭan parolon super lia ĉerko en la kremaciejo Motol prezentis s-ano J. Mařík. Honoron al lia memoro!

Kristnaska vespero 1988

Kiel ĉiu jaro, tiel ankaŭ la jaro 1988 rapide pasis kaj proksimiĝis Kristnasko. En nia klubejo en la Kodanská-strato okazis tradicie je la 19-a de decembro 1988 la kluba Esperanta Kristnasko. Sur la tablo, frunte de la klubejo, staris ornamita, bela kaj ankoraŭ de arbaro bonodoranta kristnaskarbeto – piceo. Ĝiaj branĉetoj estis ornamitaj per koloraj, brilantaj ornamoj, en kiuj reflektiĝis la luno de brulantaj kandeloj. Sub la kristnaskarbeto la partoprenantoj amasigis multajn kristnaskajn donacetojn. Sur ĉiuj tabloj estis kristnaska bakaĵo, dolĉa kaj ankaŭ sala, kafo, vino. S-ano klub-prezidanto Ing. Veselý inaŭguris la solenan vesperon, ni ĉiuj tintigis la glasojn je la sano de ĉiuj kaj ankaŭ je Esperanto kaj komenciĝis amuzo. La infanoj kantis kaj recitis Esperante kaj ĉeĥe, ĉiu klubano ricevis almenaŭ malgrandan donaceton. Dum la tuta kristnaskvespere sonis agrable kaj silente kristnaskaj melodioj de magnetofone. Sed ĉio bela finas kaj tiel ankaŭ nia kristnaskamuzo finiĝis. Ni deziris reciproke ĉion bonan dum la novjaro 1989 kaj bonetose iris hejmen. (L. Křesinová)

Kion mi farus, se mi gajnus milionon

(Kursa tasko)

Ĉar mi neniam havis multe da mono, mi estus certe embarasita, se mi gajnus milionon. Kion mi farus?

Certan parton mi forsendus al paca movado. Poste mi ŝatus viziti la naskiĝlokon de mia panjo. Ŝi vivis en Siberio, sur la bordo de la lago "Bajkal!" Tiun viziton mi volus realigi vintre, ĉar mia panjo ofte rakontadis pri bela siberia vintro, ke ĉie estis multe, multe da blanka, pura neĝo kaj ke la neĝeroj falis teron kiel grandaj, belaj, blankaj floretoj.

Ankaŭ mi transloĝiĝus en vilaĝon kaj mi disvendus ĉiujn senbezonaĵojn. En kamparo mi aĉetus domon kun ĝardeno. En la domo estus unu granda ĉambro, kie mi havus multajn librojn kaj multajn etaĝerojn. En la unuajn etaĝerojn mi metus legatajn librojn, en la duajn jam tralegitajn kaj en la triajn la librojn legotajn. Sed la kvaran malplenan etaĝeron mi preparus per eldonotaj libroj.

En biblioteko estos ĉefe libroj pri historio, muziko kaj folklore, diversaj kantoj, kutimoj, dancoj kaj pri popolaj proverboj.

En ĝardeno mi ŝatus havi multajn diversajn belajn florojn kaj florantajn kaj florantajn arbojn. Ankaŭ birdojn, al kiuj mi ĵetadus grenerojn kaj panerojn, por ke ili kantu al mi dum tago kaj nokto. Ankoraŭ mi volus... sed mi ne povas, ĉar de mia miliono restus nur kelkaj moneroj!

Ĉio finiĝas kaj ankaŭ miaj revadoj!

(Pleskotová)

Ekkonu kaj protektu!

Je mia pasintjara somera ekskurseto tra la kverkarbaro proksime de la urbn Nitra mi trovis grandan kaj belegan skarabon, kiu nomiĝas lukano (Lucanus cervus). Ĉar la skarabo interesis min, mi volis scii ion pri ĝia evoluo kaj vivmaniero. La faka biblioteko de la Terkultura altlernejo en Nitra helpis al mi:

Lukano estas la plej granda skarabo en la meza Eŭropo. Ĝi estas nigra-bruna, sur la dorso kaŝtankolora. Ĝi vivas en maljunaj kverkarbo malpli ofte en fagarbaroj). Lukano preferas ebenaĵajn arbarojn, sed escepte ni renkontos ĝin ankaŭ sufiĉe alte en la montaroj. En la jaro 1936 ĝi estis trovita en fagarbaro apud Donovaly (Malaltaj Tatroj) en la alteco 1000 m super la marnivelo.

La masklo kun "kornoj" atingas la longecon de 4 – 8 cm, la femalo havas mallongajn kaj fortajn insektajn mordorganojn, kaj atingas la longecon de 3 – 5 cm. La femalo metas ovetojn en putrajn trunkojn aŭ en la radikojn de kverko. La larvoj de lukano evoluas en la lignoputraĵo dum 3 – 5 jaroj (depende de la mikroklimato de la medio), ĝis ili atingos la longecon de 9 – 10 cm. Ili formanĝas la putran lignomaterialon. Poste ili ekkrizaliziĝas kaj daŭras ankoraŭ unu jaron ĝis el la krizalido estigas skarabo.

Lukano vivtenas sin por vegetaĵa nutraĵo: ĝi manĝas foliojn kaj ŝosburĝonojn de arboj, sed en tiel malgranda kvanto, ke ĝi ne estas konsiderata malutilanto. Plej ofte ĝi lekas per sia speciale alĝustigita buŝa lekorgano la dolĉajn sukajn, elfluantajn el vunditaj trunkoj de kverkoj kaj aliaj foliarboj. Ĝi flugadas dum posttagmezaj kaj antaŭ vesperaj horoj.

Pro sia grandeco kaj aspekto lukano estas ĉe ni kaj en aliaj kulturaj ŝtatoj protektata per leĝo, kiel nekutima, majesta loĝanto de naturo. Sismo = TURISTO =

Aleksandrs Felecis (nask. 1920)

M e n t o

Ekstere neĝo, vento.
De prujn' lacigas l'kor'.
Sed bonodoras mento
Ĉi tie, en malfor'.

La floro nevidebla
Odoras tra neĝond'.
Ne kisos ĝin mi febla,
Sed varmos mia mond'.

Ne – la gamel' ne bolas.
Frostegas ĝis torpor'.
Sur bretkuŝej' mi solas.
Sed kreskas revoflor'.

Multfoje bruis vento,
Min savis mia vol' -
Mi vin dankegas, mento,
Ke ne frostmortis l' kor'!

El la latva lingvo esperantigis
Arturs Kubulnieks

La poeto kaj prozverkisto Aleksandrs Felecis, membro de la Unuiĝo de la sovetaj verkistoj de Latvio ekde 1982, skribis al Arturs Kubulnieks:

"... mi deziras kaj permesas al vi traduki miajn versaĵojn, kiuj estas presitaj en Sovetaj eldonaĵoj, libroj, en la lingvon Esperanto. Samtiel – la tradukojn de mia poezio vi pevas sendi al kiu ajn ŝtato, kiel vi mem volas kaj trovas bezona. La poezie devas soni trans limoj kaj Esperanto povas helpi al ĝi soni."

La versaĵo Mento certe estas rememoro el tiuj 23 jaroj post la dua mondmilito, kiujn li devis pasigi en la Ekstrema Oriento kiel malliberulo. La poemo estas el kolekto "La spitema frakseno", kiun eldonejo Liesma (Flamo) en Rigo aperigis en 1987.

Jana Cíhová

M a r d o

Mardo estas bela tago!
Eĉ se mi en koro triston havas
kaj ekplori emus,
scias mi.

- hodiaŭ ni nin vidos,
- hodiaŭ ni kunestos.

Suno certe brilos, kaj varmigis,
eĉ se la nubetoj maliceme strebos
antaŭ ni ĝin kaŝi.

Fartos mi bonege,
Mi feliĉon sentos kiel ĉiam, ĉar mi scias,
ke vi ankaŭ sentos vin feliĉa.
Iras ni tra Praha.

Montros Ĝi al ni,
kiom belis Ĝi en tempo,
kiam ni ĉi tie estis ne ankoraŭ.
Ni forgesos tutan mondon.
Nur komunaj interesoj ligos nin.
Praha estas tiom bela, se vi min komprenas!

Praha estas tiom bela, se vi min bezonas.
Praha estas bela!
Vivo estas bela!
Mardo estas bela!
Mardo estas tago – tiu el la plej belegaj!

Dediĉita al M. A. J.
El poemaro "Kvar se zonoj"

Sciigo pri la konstruado de la Cimrmana monumento

Traduko de prelego de Zdeněk Svěrák fare de
P. Vondruška

Permesu al mi, ke kiel prezidanto de komisiono por la konstruado de Cimrmana monumento, sciigu vin, kion ni jam atingis en tiu afero.

Unua impulso al "Ago monumento" eliris de D-ro Bičík. D-ro Bičík, naskito de Malá Strana (Malgranda kvartalo en Prago), persvasas pacience jam dum dudek jaroj la aŭtoritatojn, ke sur la placo de Malá Strana, alie belege konstruita, io mankas. Foje li alportis al la kunisido de nia komitato por Cimrmanaj solenoj du bildkartojn. La unua estis malnova, ankoraŭ de la tempo, kiam tiu placo portis la nomon de marŝalo Radecki kaj kiam ĝin dominis grandega monumento de la marŝalo. La dua bildkarto estis nuntempa. Per zorgema komparo de ambaŭ bildkartoj ni devis konsenti kun D-ro Bičík, ke sur la dua bildkarto io mankas. Estis la monumento. Al ni ŝajnis tute logike konstrui sur la loko de monumento de Radecki, tiu ĉeĥa helpanto de Habsburgoj, monumenton de J. Cimrman, kiu helpis al Habsburgoj neniam per io.

Tamen dum propra realigo de la ideo naskiĝis grandegaj malfacilaĵoj. Unue la materialo. Estas konate, ke kiam Cimrman lastafoje forlasis Pragon kaj adiaŭis en Bohnice sian amikon Trefný, li diris al tiu laŭvorte: Milan, (li nomiĝis Milan), se Prago iam pripensos mian monumenton, ĝi estu el blanka marmoro. En blanko mi frontos plej bone kontraŭ kolombojn. Ĉar nia Cimrmana asocio ne havas sufiĉe da rimedoj por financado de la monumento el tiel kvalita materialo, ni serĉis kompanianon. Ni trovis lin en asocio, kiu staris antaŭ simila problemo. La redakcio de la gazeto "Ĉevalo – amiko de homo" ŝatus dediĉi al la ĉefurbo monumenton de ĉevalo. Estas ideo laŭdindega. Nur trarigardu la Pragajn monumentojn. Kiu el niaj granduloj estas sur ĉevalo? Sankta Venceslao kaj sankta Georgo. Sed tio estas sanktuloj. Oni povas eble mencii ankaŭ Jan Žižka. Sed: Palacký sidas sur seĝo, Jungman sidas sur seĝo, Jirásek sur arbostumpo kaj la verkistino B. Němcová la skulptistoj senzorge lasis stari. Do oni decidis, ke la Cimrmana monumento estos rajda. Ni rifuzis la kontraŭdirojn de nia piediranta alo, kiu opinias, ke rajda monumente estas ideo erara, ĉar Cimrman laŭdire neniam sidis sur ĉevalo kaj eĉ timis ĉevalojn. Nome la majoritato de ni supozas, ke la ĉevalo estus poeta licenco en limo de normo. La projekto de rajda monumento sur dumetra marmora soklo renkontis reziston de io alia: de troleoj. La trafikala entrepreno de la ĉefurbo Prago – kaj mi jam rekte nomos – la vicprezidanto Josef Kudrna ne volis pri rekonstruado de trolea reto eĉ aŭdi.

Kaj fojfoje alportis D-ro Bičík apartan kompromisan proponon: por ke Cimrman povu sidi sur ĉevalo kaj ne superu la nivelon de troleoj, li prezentis sian faman "varianton — vadejo". La monumento reprezentus Cimrmanon vadantan rajdante tra akva fluo, kaj la ĉevalo estus mergita je brusto en la soklo, kaj do ĝi estus konceptita verdire kiel ĉevala busto. Sed kun ĉi tia propono ne konsentis niaj amikoj el Ĉevalo – amiko de homo. Ili ne povis malhavigi sin de impresoj, ke la besto dronos. Do ili rekomendis, ke Cimrman ne sidu sur la ĉevalo, sed la ĉevalon konduku. Tiel la alto de la monumento nepre malgrandiĝus, sed fakte tio signifus, ke Cimrman estus de nordo per la ĉevalo tute kaŝita.

Do ni devis forlasi en niaj pensoj la lokon, kie staradis marŝalo Radecki, nome sur pereno de tramo, kaj serĉi novan lokon ekster la trama linio. Ni trovis ĝin, iom pli alte, en la spaco de aŭtoparkejo. Kaj ni havis feliĉon. La gardisto, sinjoro Josef Landa kontraŭdiras nenion, sed li ne kuraĝas decidi mem. Li devos konsulti ankoraŭ doktoron Priznicki, kiu alternas kun li.

Tiel stas la afero kun nia monumento; kiam okazos io nova, ni tuj informos vin.

Anguleto per krucenigmo

Kaŝfrazo de krucenigmo en Bulteno 1/1989

FLORON LAŬDU POR ODORO KAJ LA HOMON POR LABORO

Alvenis 8 solvoj, 6 estis korektaj.

Sukcesaj solvintoj: Eva Seemannová, Bartoloměj Kolibár, Vlasta Horáková, Jiří Haering, Zdenka Ločařová, Horst Theurich el GDR.

Ni gratulas kaj sendas malgrandajn premiojn.

S-anino Seemannová skribis al ni:

Estimata samideanino,


vian krucenigmon en la januara praga Bulteno mi solvis relative facile, vespere en tiu tago, kies poŝto alportis ĝin. Kvankam mi tute bone parolas la verdan lingvon (jam kelkajn jardekojn mi havas la ŝtatan ekzamenon), estis la unua esperanta kruc-enigmo, kiun mi provis solvi. Kaj mi volonte konfesas, ke mi bone amuziĝis. Estas vere taŭga rimedo por tiuj, kiuj deziras priekzameni siajn sciojn.

Do jen solvo: FLORON LAŬDU POR ODORO KAJ LA HOMON POR LABORO

Kore mi salutas vin kaj deziras sukcesojn ĉe pluaj kaj pliaj krucenigmoj.

Eva Seemannová

La hodiaŭa krucenigmo de Ivan Slávik temas pri homa eco.



Horizontale: 1. Unua parto de la kaŝfrazo. 2. Ne voli scii, intence ne atenti – fiksi vian spiriton al io (gardu, maldormu, malignoru). 3. Du radiusoj – ronda kaveto sur la ventro – aŭtosimbolo de Trnava. 4. Respektoplena al Dio – tre malmulte – spirebla gas' ĉie ĉirkaŭ ni. 5. Meritanta ion – malbonulo de Othello – provizi per bataliloj. 6. Gramo – greka litero – Japana ludo – aŭtosimboloj de Louny kaj Brno-distrikto – unuo en Romo. 7. Prefikso signifanta ricevi aŭ doni ion al iu por certa tempo (prunti per mono) – homo staranta kontraŭ ni – sufikso pligrandiganta. 8. Stultaj bestoj – moviĝanta, paŝanta. 9. Dua parto de la kaŝfrazo.

Vertikale:

A. Eligi akran kaj malagrablan sonon, kiel ekzemple cikado kaj grilo – manuzebla batalil'. B. Sufikso esprimanta la agon por fari ion – cirklofoma pec' de materio (ankaŭ geedza simbol') – ago por kontentigi bezonon. C. Numeralo – unua hom' – Esperantisto Slovaka. D. Konvulsie elĵeti tra la buŝo la enhavon de la stomako – hom', kiu amas. E. Loĝlokoj de multaj homoj – vegetaĵo kies rezino estas laksiga. F. Persona vira pronomo – prezent' al si en la spirito antaŭe viditajn bildojn aŭ sentojn – vorteto, kiu almetiĝas apud vortoj sendifinaj por insisti pri la nedifiniteco. Ĝ. Saluto de infanoj – fama nomo de modernaj konstruaj ludiloj – dek centoj. H. Enflamigo de la orelo – monero en Italuje (itale). I. Enhavante neniam aŭ nur malmulte da akvo, suko, graso kaj plie, same, egale kiel aliaj. J. Virino – ligna vegetaĵo – neodimo en ĥemio. K. Sufikso prezenta pasiva – tio, pri kio oni parolas aŭ skribas – malgranda. L. Manĝigi – lasas fari ion ia aŭ faras ion ia.

La programo de la kunvenoj de la Esperantista Klubo en Prago:

3. 4.	Novajoj el la Esperanto-movado	- J. Patera
10. 4.	Sorĉista vespero	- L. Rýznar, Pardubice
17. 4.	Libera tribuno	
24. 4.	Lingva praktiko kaj beletra evolucio (laŭ G. Silfer kaj Eli Urbanová)	- J. Patera
15. 5.	Gramatika ripetado	- J. Patera
22. 5.	Libera tribuno	
29. 5.	Trarigardo de la Esperanto-gazetaro	- H. Štruncová
5. 6.	Gramatika ripetado	- J. Patera
12. 6.	Libera tribuno	
19. 6.	Eraraj tezoj pri lingva evoluo kaj beletra praktiko (laŭ B. Golden)	- J. Patera
26. 6.	Trarigardo de la Esperanto-gazetaro	- H. Štruncová

La kunvenoj okazas ĉiulunde inter la 18.30 kaj 20.00 h en la agitcentre en Kodaňská-str. (angulo de Norská-str.)

Niaj jubileantoj:

aprilo	–	Jaroslav Tomčík
majo	–	Svatava Matějíčková
junio	–	Bedřich Fišera
		MUDr. Helena Kafková
		MUDr. Alena Koudelová
		Václav Mašek
		Marta Svobodová
		Vilma Dvořáková

Sinceran gratulon al ĉiuj!

Dankon por la donacoj por la kluba kaso en 1988: Ungerová 470,- Kčs, A. Bursová 100 Kčs, M. Cejnarová 30 Kčs, J. Karen 10 Kčs, L. Kyněl 30 Kčs, J. Mařík 20 Kčs, J. Patera 15 Kčs, J. Šilhán 70 Kčs, Ing. L. Veselý 45 Kčs, A. Vozáková 20 Kčs, Z. Zikmundová 5 Kčs.

Do výroční členské schůze nezaplatilo členské příspěvky 56 členů. Doufáme, že ti, jichž se toto upozornění týká, tento nedostatek brzy napraví. Pokud jste složenku ztratili, vyzvedněte si při pondělní schůzce novou, nebo si o ni napište na adresu KEP.

BULTENO – eldonas Esperantista Klubo en Praha, baza organizaĵo de ĈEA, p.k. 1069,

111 21 Praha 1 – por siaj membroj. Redaktas Jiří Patera kaj Dana Davidová.

Došlo po uzávěrc: 16. esperantský mezinárodní šachový festival se koná ve dnech 19.-28.6.1989 v Jablunkově. Termín přihlášek 30.4.1989 na adresu Dr. Jaromír Canibal, Okružní 867, Karviná 734 01. Přihlášku je možno, si vyžádat u Ladislava Fialy, Fügnerova 28/19, 290 01 Poděbrady. Tam je možno také dostat přihlášku na "Jarní probuzení", akci šachové sekce v Poděbradech ve dnech 14.-16.4.1989 s kulturním a turistickým programem.